Lucka Esperanto-klubo “Arbara kanto”turnas sin al la prezidio de UkrEAkun propono honorigi la veteranon de la ukraina E-movados-ron Ihor DRUL kiel Dumviva honora membro de la Asocio.

Ihor Drul estas veterano kaj elstara aktivulo de E-movado en Ukrainio.

Eklernis Esperanton en la 1961 dum la kursoj gvidataj de la pioniro de Internacia Lingvo Anatol Koĥ.

Partoprenanto de Junulara seminario de klubgvidantoj (1967, Praha, Ĉeĥoslovakio), de preskaŭ ĉiuj Oresto Kuzma-Tagoj, kelkaj UkrEA-kongresoj.

Li tradukis al Esperanto kaj eldonis kiel aparta broŝuro parton de la libro pri Anatol Koĥ. Kompilis kaj proprakoste eldonis ukraina-esperantan proverbaron. Estas kunaŭtoro de la Libro de la ukrainaj proverboj tradukitaj al 12 lingvoj (esperanta parto), estas kunlaboranto de gazetoj “Ukraina stelo” kaj “Helianto”, liajn artikolojn publikigis centra revuo de UEA “Esperanto”, aliaj periodaĵoj.

S-ro Ihor estas klubano kaj kunfondinto de Lucka Esperanto-klubo “Arbara kanto” (1985), aktiva korespondanto, gastiganto.

Prezidanto de la Lucka EK “Arbara kanto”, Niko Voloŝin. 20.08.2018.